



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jara abono 1975

30,- GM
40,- GM kun
germana eldono

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 43/1974 - 16 dec 1974
Aperas ĉiusemajne

Esperantistaj aktivecoj en FR Germanio dum 1974

El la jara raporto de la estraro de GEA

Nürnberg (pp) La estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) pretigis sian raporton por la jaro 1974, kiu aperos en n-ro 8 de Germana Esperanto-Revuo de la jaro 1974. El tiu raporto ni citas du alineojn:

Gravaj oficialaj kontaktoj

La Universala Kongreso (UK) donis la eblon al multaj oficialaj kontaktoj kun urbaj kaj tutŝtataj politikistoj kaj aliaj eminentuloj, ankaŭ dum la preparperiodo.

En junio 1974 d-ro Werner Bormann kaj lia edzino bonŝance povis renkonti la federacian kancelieron Helmut Schmidt. La ambasadoro de Aŭstralio, Ralph Harry, invitis ĉiujn ambasadorojn, unuajn sekretariojn respektive kulturataŝeojn de la Bonn-aj ambasadoj al akcepto, en sia rezidejo, la 6-an de junio. Ĉeestis 30 diplomatoj, la tiama prezidento de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, kaj la prezidento de GEA, d-ro W. Bormann.

Laŭ iniciato de italaj esperantistoj apartenantaj al la Socialdemokrata Partio, la membrino de la estraro de GEA E. Bormann insistis ĉe pluraj gvidantoj de la germana Socialdemokrata Partio, kaj sekve la partiestrara departemento pri internaciaj aferoj estas traktanta la aferon. Unuaj interparoloj kun oficistoj de la partia estraro okazis somere 1974.

Prof. d-ro Helmar Frank kaj kelkaj liaj amikoj levis la lingvoproblemon al la diskuto dum la federacia konferenco de la Liberaldemokrata Partio, en Hamburgo.

La reprezentanto de GEA ĉe la Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) estis U.J. Moritz, vicprezidento de GEA. Li partoprenis EEC-kunsidojn en Hannut (Belgio), printempe, kaj en Hamburgo, somere, korespondis kun prof. Ralf Dahrendorf (unu el la du tiujaraj EK-komisaroj de FRG en Bruselo) kaj kun aliaj germanaj kunlaborintoj de la t.n. Janne-raporto, diskutis en Bruselo kun kompetenta EK-oficisto pri eblecoj ke tiu aŭtoritato konsideru la proponojn de la Esperanto-movado kaj konservis la ĝeneralan kontakton kun la EEC-gvidantoj. (Tiuaj laboroj estis trioble malfacilaj, ĉar, unue, EEC evidente ne havas klarajn agad-liniojn, due, la Esperanto-asocioj en la koncernataj landoj apenaŭ aŭ tute ne kunlaboras, kaj, trie, la alparolantoj, t.e. la funkciuloj de ŝtatoj kaj de EK, ankoraŭ ne vidas la amplekson de la lingva problemoj kaj, do, ne povas serioze trakti niajn proponojn.)

Resuma prijuĝo

La ĉefaj laboroj de GEA kaj GEJ dum 1974 estis ligitaj, tiel aŭ alie, al la kongresoj internaciaj, pri kiuj la amasmedioj en FRG vaste informadis. Tio estas evidente la tre pozitiva elstaro de la laboroj. Tamen, restas la maltrankviliga situacio ke ne sufiĉe multaj volontuloj aperas por intense kaj intime kunagadi en la gvidado de GEA. Tial la estraro de GEA ripetas sian pasintjaran apelacion: Unuiĝu ĉirkaŭ GEA kaj aktive kontribuu al la antaŭenigo de niaj komunaj taskoj.

Atentigo: Al ĉi tiu eldono estas aldonita la 2a Literatura Informilo de la Internacia Rondo "Amikoj de la Esperanta literaturo kaj kulturo".

Pri Germana Esperanto-Revuo

Vendrede, 20 dec, eliros n-ro 7/74 de Germana Esperanto-Revuo. La numero entenas jenajn rubrikojn:

Internacia Panoramo, i.a. kun vojaĝraporto de s-ino E. Bormann pri "Vojaĝo tra Pollando".

El la Germana Esperanto-movado, i.a. kun raporto pri la pasinta kunsido de la estraro de GEA kaj la unua kongresa bulteno por 53a Germana Esperanto-Kongreso 1975 en Oberkirch.

Pozitive Junulara bulteno

Kulturo - literaturo kun la unua parto de la ISU-prelego de prof. Gaston Waringhien "La inkunabloj de Esperanto" kun enkonduko de Reinhard Haupenthal kaj plia daŭrigo pri "La aventuroj de Simplicius Simplicissimus".

La titolpaĝo enhavas foton pri la venontjara kongresloko Oberkirch kaj invitartikolon de F.W. Poppeck. Ĉefartikolo sur la dua paĝo nomiĝas "Marconi, Popov, Radio kaj Esperanto" kun la subtitolo "Pri la unaj Esperanto-elsendoj" el la plumo de D-ro Antonio De Salvo, redaktoro de la Esperanto-fako de Radio Roma. La numero enhavas 5 pliajn fotojn.

Eŭropa Esperanto-Revuo

En interkonsento kun la estraro de Germana Esperanto-Asocio kaj post cirkulera enketado inter la legantoj de Germana Esperanto-Revuo la eldonejo de Germana Esperanto-Revuo decidis, ke la ĝisnuna Germana Esperanto-Revuo aperos ekde 1975 sub la titolo "Eŭropa Esperanto-Revuo".

Ne estas sekreto ke la Esperanto-gazetaro, simile kiel multaj naciolingvaj gazetoj kaj revuoj, troviĝas en krizo, kaŭzita i.a. pro la eksplodo de la kostoj kaj nesufiĉa kvanto de pagantaj abonantoj. Oni povas konstati, ke preskaŭ neniu el la ĝisnunaj landaj organoj de la Esperanto-movado estas vivokapabla, se ĝi aperu en presita formo kaj kun alta nivelo. La plej multaj landaj organoj nur fariĝis bultenoj aŭ cirkuleroj.

Ankaŭ Germana Esperanto-Revuo suferis sub la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj. La celo de la alinomigo estas altiri pli da abonantoj el la eksterlando kaj el la lando mem. Eŭropa Esperanto-Revuo ne volas konkurenci al la du gravaj internaciaj gazetoj: revuo Esperanto kaj Heroldo de Esperanto. Sed la eldonejo kaj redakcio vidas breĉon, kiun ĝi povas plenigi.

Germana Esperanto-Asocio kaj la eldonejo Ludwig Pickel rezervigas al si la rajton pri la nomo "Germana Esperanto-Revuo". Neniu persono aŭ organizo estas rajtigita uzi tiun titolon por revuo.

Eŭropa Esperanto-Revuo aperos 8foje jare, la jara abonkotizo estas 16,- GM. Mendojn akceptas: Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113. La unua numero aperos komence de februaro 1975.

Numero 8/74 de Germana Esperanto-Revuo aperos meze de januaro 1975

Granda intereso pri E-vortaro el GDR

Nürnberg (pp) El 200 demanditaj personoj pli ol 60 respondis, ke ili havas intereson pri la ampleksa vortaro Deutsch-Esperanto, kies manuskripto kuŝas prespreta en Leipzig. Multaj eĉ jam nun devigis sin aĉeti la vortaron. Espereble la eldonejo Enzyklopädie, Leipzig, GDR, baldaŭ eldonos ĝin.

Okaze de la Zamenhofa Tago

Esperanto-nikolao aperis dum la Zamenhofa Festo de Sarlanda Esperanto-Ligo, kiun ĉeestis ĉ. 20 personoj.

Prezaltigo ĉe STAFETO

La Laguna (pp) Juan Régulo, estro de la eldonejo Stafeto, en cirkulero al la redakcioj de Esperanto-gazetoj, anoncas prezaltigon por la libroj eldonitaj ĝis la jaro 1969. La cirkulero tekstas:

"Jen mi kunsendas por via informiĝo kaj por recenzo la tri lastajn titolojn aperintajn sub la marko STAFETO. Ili debutis dum la Universala Kongreso en Hamburgo, sed ĝis nun mi ne povis ilin dissendi al la gazetaro kaj al la libroservoj pro manko de helpantoj. Mi devas informe aldoni, ke sur la nefirman ekonomion, kiu apogas la STAFETO-eldonojn, lastatempe falis ne malmultaj suferoj, ĉiuj fremdaj al la entrepreno mem: la ĝenerala plialtiĝo de ĉiuj kostoj, ĉiuj rapidigas nin al stato de ĉion manganta inflacio, estas io, kion ĉiuj konas kaj mi ne devas substreki. Nur du solvoj estas praktik-eblaj por eliri el tiu marĉo: aŭ mortigi la entreprenon, aŭ plialtigi la vendoprezon de la libroj por iel peni kapeigi la ŝtormon. Neniu el ambaŭ solvoj plaĉas al mi; sed pro iela instinkto savi, kion mi amas, mi elektis la duan - je kio mi petas vin bonvole akcepti ĉiajn ekskuzojn el mia flanko.

Kvindeko da libroservoj kaj libriste konstantaj mendantoj, kaj aliaj kvincent amikoj, ĉiuj regule aĉetas miajn librojn pere de la ordinaraĵ librovendejoj de la Movado, afable akceptu, kaj mian dankon por ilia daŭra subtenado, kaj la prezaltigon, kiun mi devas hodiaŭ anonci. Mian dankon mi firme deklaras: vian akcepton de la novaj prezoj mi espereme atendas.

Mi nun presas novan Katalogon de miaj eldonoj, kie ĉiuj libroj eldonitaj ĝis 1969, ankoraŭ neelĉerpitaj, ekde nun estas vendataj je duobla (rondigita) prezo ol la ĝisdata; kaj la aperintaj post tiu jaro provizore konservas siajn originajn prezojn.

Mi nun ekprovas ofsetan presadon, por sondi eldonkostojn kaj akcepton de la varo je la prezo, kiun tiu presmetodo diktos. Espereble iel aŭ tiel mi povos lanĉi la jam akceptitajn titolojn kaj poste eventuale aliajn, se tiu nova vojo montriĝos praktikebla.

En tia eldonlabilo mi sendas al vi la tri novajn titolojn, kune kun la esprimo de mia antaŭdanko pro via informa kaj recenza subtenado."

Pri la tri titoloj cititaj supre Pilo-Press jam raportis. Ili estas:

Proverbaro Esperanta de L.L. Zamenhof, 2a Eldono
12,5 x 19 cm, 196 p., broŝ. 9,- DM

Mi devas vivi, poemoj de Kjell Walraamoen kaj Lina Gabrielli, 12,5 x 19 cm, 156 p., broŝ. 9,- DM

El la vivo de bervalva sentaŭgulo, maldeceta epizodaro de Louis Beaucaire, 12 x 18,5 cm, 136 p., broŝ. 9,- DM

La libroj estas haveblaj ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg

Italio en agonio aŭ angoro

"Italy in agony" estas - laŭ Radio Roma - la titolo de artikolo aperinta la 18an de novembro en la prestiĝa brita gazeto "Time". La artikolo vekis viglajn reagojn fare de la itala gazetaro, kaj eĉ havis reeĥon en la itala parlamento, ĉar oni emfazis, ke finfine, malgraŭ la neneblaj malfacilaĵoj, Italujo ankoraŭ ne estas en agonio, do baldaŭ mortonta. - Nur kiam la animoj jam estis varmigitaj, oni klarigis ke la anglalingva esprimo "agony" ne egalas al "agonio", sed al "angoro", kaj do la titolo intencas simple diri "Italujo sub la premo de malfacilaĵoj".

Bonvenigu jarfine
en Paderborn

la jaron 1975 kaj la Esperanto-Jaron 89

Partoprenu en la granda internacia Silvestra Balo

Vizitu la libro-ekspozicion de Libroservo Pickel
en la magazeno SÜDRING en Paderborn 28.-31.12.74

Krome okazas, kiel ni jam antaŭanoncis, en Paderborn la
18a Internacia Seminario de GEJ Junulargastejo
de 27 dec 74 - 3 jan 75
sub la temo "Natursciencoj - ĉu nur por fakuloj?"

kaj Intensaj Esperanto-kursoj kun la ebleco fari lingvajn
ekzamenojn

POLAJ AER-LINIOJ



La pola flugkompanio uzas Esperanton. Nun ĝi ankaŭ eldonis notkajereton kun E-teksto, kiu estas senpage haveblaj ĉe POLAJ AER-LINIOJ LOT, str. Grójecka 17, Varsovio, Pollando. Mendu ilin kaj ankaŭ la aliajn E-eldonaĵojn de LOT. Esperanto-revuoj estas petata represi la informon!

Esperanto en la radio

Varsovio. La dimanĉa Esperanto-Ekspreso estis dediĉita al Zamenhof kaj la Esperanto-libro. Oni aŭdis Zamenhofajn voĉojn, tiun de L.L. Zamenhof el la jaro 1908 kaj tiun de lia nepo el la jaro 1974. Pripensindaj estis la felietonaj vortoj de Jan Klimek okaze de la Zamenhofa tago. Manko de monaj rimedoj vere bremsas la E-agadon. Ideoj ne mankas, sed la realigo dependas de la fortoj disponeblaj! - Dum la pasintaj semajnoj finnaj temoj dominis en la Varsoviaj elsendoj, al kio kontribuis la restado de A. Pettyn en Finnlando kaj la 80 korespondadoj, kiujn la redakcio ricevis dum novembro el Finnlando. Unu sola fina aŭskultanto skribis pli ol 40 leteroj. Do, fakte ne surprizis, ke la unuan premion en la konkurso de la Esperanto-redakcio okaze de la 15jara ekzistado gajnis fina aŭskultanto, nome s-ro Sakari Kauppinen el Velaatta.- A. Pettyn intertempe denove revenis el Finnlando, kaj en la Varsoviaj E-elsendoj aŭdiĝas de kelkaj tagoj nova virina voĉo. - A. Pettyn ekzigis el la funkcio de ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio, kiel oni povis aŭdi en unu el la rubrikoj de PR "El la vivo de PEA". - Ankoraŭ estas tempo, ĉis la 31.12.74, por partopreni. Vidu PP n-ro42/74, p. 4! - Bedaŭrinde la posttagmezaj E-elsendoj el Varsovio momente estas nur malbone aŭdeblaj, cetere tio validas ankaŭ por aliaj stacioj, ekz. Vieno.

Berno. Bone aŭdeblaj estas elsendoj tagmezaj el Berno. D-ro A. Baur daŭrigis siajn prelegojn pri svisa arto, pentroarto. Kaj ges-roj Gacond plue "malfermas la leterkeston" de Svisa Radio. Ne ĉiam realcaj estas la opinioj de aŭskultantoj. Unu hungaro opiniis, ke centoj da miloj de esperantistoj aŭskultas al la E-elsendoj, sed ke nur malmultaj skribas al la redakcioj. De kie venu la centmiloj da aŭskultantoj?